

Laŭ la humoro mi desegnas mian estontecon

Rusa kantistino ravita de nia lingvo

Polina Kalnitskaja
intervjuas
Anastasija Pogorelova



Post sukcesa partopreno en la Ateliero organizita de FEM ĉi-somere ĉe KCE, Polina Kalnitskaja debutas sur la paĝoj de nia revuo.

Ĉiuj havas siajn kialojn por lerni esperanton. Iujn inspiras la ideo de lingva egaleco, aliaj estas ravitaj de la gramatika logiko kaj vortfarado, kaj iu estas ĉarmita de lingva muzikeco kaj harmonio. Kial decidis lerni esperanton Anastasija Pogorelova, 20-jara kantistino, studentino de la tria lernoĵaro en la Rusia muzika akademio Gnesin, fako de akademio kantado?

Kun muziko mi estas ligita ekde infanaĝo, komencinte de barda kantado kun la gepatroj, en beba aĝo. Ekde la 12-jariĝo mi aliĝis al klubo de amatora kanto. Mi vizitadis rusiajn kaj eksterlandajn urbojn kun tiu ĉi bonega kolektivo. Poste venis muziklernejo, ĥora ateliero, kaj la kolegio de muzika kaj teatra arto de Galina Višnevskaĵa. Mia nuna engaĝo venas el tio.

Kaj kion vi planas fari post la finstudado en la akademio?

La tempo tion montros. Mi ne dubas, ke mi instruos. Mi ŝatas la procezon de serĉado de ĝustaj sonoroj kaj interkomprenon kun la lernantoj. Nia profesio estas krea rilate serĉadon de si mem kaj sia propra voĉo. La strikta tekniko ne ekzistas, ĉiuj apogas sin al siaj sentoj kaj sentoj de aŭtoritatuloj. Ĉar oni devas elpensi, provi, transdoni siajn sentojn, sugesti al la lernantoj kiel ili povas trovi la proprajn. Nu, mi instruas kelkajn geknabojn. Tio estas pedagogia praktiko en la akademio, sed mi laboras ankaŭ kun la geamikoj, kiuj volas kanti por si mem. Ni okupiĝas pri tio kun granda plezuro.

Mi jam havis la sperton kanti tutan koncerton, estis provo. Temis pri malfacila eksperimento, eble eĉ tro frua, ĉar tia daŭra kantado estas tre riska por la voĉa aparato, speciale en stresa stato. La voĉo pro tio povas kondukti iel ajn. Sed la spektantoj estis kontentaj, oni diras, ke ĉio sukcesis.

Mi koncertos nepre, kaj se paroli pri la teatra kariero – por tiu necesas aranĝi la tutan vivon alimaniere... Ni vivos – ni vidos!

Mi opinias, ke la ruslanda voĉedukado ne estas sufiĉa. Plimulto da instruistoj estas sovetiaj kantistoj, sed la sovetia skolo jam ne es-



tas aktuala, ĝi postrestas la eŭropan nivelon. Necesas lerni la italan etalonon, italan kantan skolon.

Kiajn verkojn vi havas en via repertuaro?

Unue, la klasikan muzikon, por edukado kaj por koncertoj.

Pasintjare estis la ducenta datreveno de la Patruja milito de 1812, kaj mia repertuaro akcentis tiun ĉi temon, des pli ke mi regule koncertas en historiaj rekonstruaj eventoj, en kostumbaloj. Sur la kampo de la Borodina batalo ni organizis improvizteatron, kaj nun ni volas prepari ion pli seriozan. Speciale por mi estas verkata nun vodevilo, kie mi havos la ĉefan rolon. Do, mi devas koncerti eĉ en kampaj kondiĉoj. Antaŭ ne longe mi partoprenis historian kostumbalon en Sankt-Peterburgo. Fascina atmosfero, ĉio estis laŭ la modo de la unua kvarono de la XIX jarcento. Ĉi tien ne venas scivolemaj hazarduloj, ĉiuj estas konstantaj partoprenantoj de similaj eventoj. Ili kutimas kondukti laŭ la ĝusta stilo, digne, galante, tenante sin tute nature. Tio ĉi estas tre agrabla, precipe por junulinoj, ja en nia tempo galantaj kavaliroj maloftas. Baldaŭ mi veturos por la balo al Kaliningrado, tie estos alia periodo – fino de la XIX, komenco de XX jarcento – la balo estos dediĉita al la 400-jara jubileo de la cara familio Romanov. Tie mi estos la invitita ĉefkantistino.

Mia repertuaro estas orientita al la restaŭrada epoko. Speciale valoras, ke ankaŭ la muziko estis verkita en tiu tempo. Romancoj, ekzemple. Mi akiris arkivan romancaron, verkitan de la duonfilino de Napoleono, Hortense de Beauharnais, dediĉitan al la familio. Krom la historiaj verkoj estas pecoj kiel «Juna ĉarmulino» de Tihon Ĥrennikov.

En kiuj lingvoj vi kantas krom la rusa?

En la itala, certe. Kaj mi studas la italan. En la franca, germana, angla, hispana fojfoje. Mi kantas ankaŭ ukrainajn popolokantojn, belorusajn.

Kial vi decidis lerni esperanton?

Mi tre ŝatas ĝian muzikecon. Tre delikate ĝi sonas. En ĝi aŭdiĝas la aparteno al la latinida familio, sed en la harmonioj, se analizi la muzikan aspekton, estas rimarkebla io slava. Tio ĉi jam ripetiĝas en mia kapo senfine. Mi aliras al ĉiuj studentoj-samgrupanoj, rakontas pri esperanto kaj proponas aŭskulti sonregistradojn de kantoj – kiel ili sonas bele. Ĉiuj admiras.

Pri la internacia lingvo mi eksciis jam en la lernejo, la instruisto pri desegnado estis esperantisto. Kaj pri ebleco lerni la lingvon rakontis amiko, kiu ellernis esperanton memstare, sed ne havis lingvan



El la repertuaro de Anastasija:

Hendel, Mio caro bene
Hendel, Lascia ch'io pianga
Hendel, Amen Haleluja
Bellini, Malinconia
Pergolesi, Se tu m'ami
Brahms, Virga kanto

Schubert, Beateco
Puccini, Ario de Lauretta el Gianni Schicchi
Faure, Papilio kaj violo
Dargomijhskij, Ario de Nataŝa el Niksino
Musorgskij, Penseto de Parasja el La foiro de Soroĉinci
Rimskij-Korsakov, Ne vento blovetante al altaĵo...
Ĉajkovskij, Pro kio



Spite al sia retenigemo, Anastasija jam verkas en esperanto. Jen ĉarma specimeno:

Sorĉa poŝtisto

**Aŭdiĝas akva plaŭdo,
La suno rampas el ĉiel'.
De egalaj pinoj drivas kolonoj,
Kadrante sorĉan arbaron.
Tie iafoje pluvas,
Sed la sunsubiro estas belega ĉiam...
Vi forvelante flustris al mi: "Atendu..."
Kaj mi atendas, ĉu vi aŭdas? Atendas vin.**

**Kaj ĝuste dudek horojn poste
Tra la vico de feliĉaj songoj
Kaj de revantaj unu al la alia voĉoj
Al mi la suno sendos vian saluton.
Kaj estos varme je la vento
Kaj eĉ en mallumo serene,
Kaj longan distancon spite
Per sorĉa poŝto mi sendos la respondon.**

praktikon. Li mem komencis kurson kaj instigis min.

Ĝenerale mi interesiĝas pri lingvoj, tiu emo estas en mi. Mi orientiĝas sufiĉe rapide, kaj strukturoj de lingvoj estas interesaj por mi.

Kion vi planas post la kurso?

Rilate esperanton? Jam nun mi estas danka al la lingvo pro multe da konatecoj. Kun plezuro mi eklernas kantojn, kaj havos ilin en mia repertuaro. Mi koncertas ne nun starante ĉe piano, dum bardaj eventoj mi kantas duete kun alia knabino. Antaŭ nelonge mi eksciis, ke la kanto "Verda faetono" estas tradukita en esperanton. Tiu ĉi kanto freneze plaĉas al ĉiuj miaj geamikoj, ĉiu renkonto finiĝas per ĝi. Se mi povos subite kanti ĝin esperante, mi pensas, tio estos eksploda sukceso. Poste, ĉio okazos kiel okazos. En ĉiuj movadoj mi trovas min kantistino, en la histori-rekonstrua movado mi estas kantistino. Tio estas mia rolo en ĉiuj aspektoj de mia vivo.

Ĉu vi havas esperantan nomon?

Jes, mi estas nomita *Belonia Niabel'*.

Multaj, lerninte esperanton, komencas verki versaĵojn...

Mi ne povas diri pri tio dume, ĉar ne scias la lingvon sufiĉe. Se cirkonstancoj akcelos, kial ne? Nun mi verkas nur ruse. Mi ŝatas, ke en esperanto ĉiu neologismo kreiĝas

laŭregule. La konstruo de vorto havas normon, la skemo estas ekzakta, kaj se vi ne rompas ĝin kaj kreas neekzistantan vorton, do esprimas tion, kion vi volas esprimi, ĉiuj komprenos vin. En la rusa ofte oni volas modeligi, sed tio sonos false.

Verkado postulas tempon. Kiel mi diras, "tempo en la kapo": agordiĝi, destresiĝi, esprimi. Tempo estas tre granda mia problemo nun. Sed mi provas sukcesigi ĉion. Eĉ stirante la aŭton mi studas, ŝminkas min, okupiĝas pri esperanto... En mia aŭto eblas dormi, pendas la robo de la XIX jarcento... La aŭto estas io meze inter la hejmo kaj la kostumejo.

La muziko estas mia ĉefa okupo, sed mi ŝatas ankaŭ piedmarŝojn, ĉevalrajdadon...

Kio ebligas al vi ĉion sukcesi?

Mi ne scias, eble, mi estas bonŝanca, ĉar Ŝafo estas mia zodiaka signo. Oni diras, ke Ŝafuloj havas tian specialecon: ĉar ili scias, ke ili ĉiam sukcesas, neeviteble ili sukcesos en la lasta momento. Sciante, ke vi povas fari multe, vi multon planas. Ĉio en mia vivo okazas spontane, sed ne hazarde. Mia plano estas diktata de mia interna stato. Mi scias kiel mi volas farti psike kaj fizike. Se oni blinde iras al la celo, eblas preterlasi ion interesan, kion oni ne vidis komence. Mi laŭ mia humoro kreas mian estontecon.

